

Flandra  **ESPERANTISTO**

TIJDSCHRIFT VOOR ESPERANTO - ONDERWIJS EN - PROPAGANDA



Konferenco de Tutmonda Junularorganizo

BLANKENBERGE,
1-5 AŬGUSTO

Ĉe la flandra marbordo kunvenis en kvintaga konferenco la gvidantoj de « Tutmonda Junular-Organizo » (T. J. O.). Malgraŭ la malfavoraj cirkonstancoj ili estis centope kaj reprezentis sep naciecojn. La tuta aranĝo okazis en la ŝtata porinstruista lernejo de la banloko Blankenberge.

Jaŭdon, la 1-an de aŭgusto, alvenis la diversaj karavanetoj, penetris en la vastan lernejan parkon, trainis densan foliaron kaj atingis idilian lokon meze de arbara densejo: pitoreskan junulgastejon flanke de malgranda senarbejo.

En la gastejo — privata posedajo de la lernejo — deĵoris la landa ĉefperanto, Carlos Braet, kaj ties helpantoj kiuj havigis praktikajn indikojn: la vira partoprenantaro loĝu en la etaĝa dormejo de la junulgastejo, la knabinoj en la vasta tendo sur la senarbejo, kie, ĉe alta masto, flirtis la verdstela flago.

La entuziasmon de la interkonatiĝo kaj, por kelkaj, de la revido, plialtigis la rava beleco de la unike ĉarma loko. Ĝojkrioj salutis ĉiun novan alvenantaron: jen la angloj, jen la francoj el Avignon kiuj jam estis dum du tagoj survoje, jen la Svisoj, jen la simpatia Karl Karlsson el Stokholmo, jen denove grupeto el Nederlando, ktp.! En la krepusko kelkaj malfrue alvenintaj tendemuloj starigis, en la « ombro » de la ĉeftendo, siajn tolajn dometojn...

La postan tagon komenciĝis la laboro: matene paroladis Drs Roelofs pri ekonomio, posttagmeze S.ano Ph. Cullus pri « Ĉu la junularmovadoj esperantistaj kaj neesperantistaj povas influi unu la alian? ». La lerneja direktoro, S.ro V. De Maeschalek, akceptis delegitaron kaj esprimis sian simpatian por la esperantista junularmovado. S.ano Carlos Braet multe dankis pro la afabla gastigo. Sekvis vizito al la vastaj lernejoj konstruaĵoj, sportejo kaj parko kies tageto estis je dispono de la naĝemuloj. Vespere okazis malferma kunveno en la granda lerneja festsalono en kies fono Flandra Esperanto-Instituto organizis librostandon. Salutis la konferencon la diversaj landaj ĉefperantoj, alvenis salutleteroj de pluraj Esperanto-organizaĵoj, j. k. letero de D.ro T. van Gindertaelen, prezidanto de Flandra Ligo Esperantista. Voĉe salutis i. a. Prof. Fr. Couwenberg, prez. de la loka sekcio de Flandra Ligo Esperantista kaj S.ano E. Cortvriendt, nome de Flandra Esperanto-Instituto, kiu substrekis, ke estas la dua fojo ke T. J. O. organizis internacian renkontiĝon en Flandrujo. Per kantoj kaj filmmontrado finiĝis la malferma solenaĵo.

Sabatmatene okazis unua laborkunsido, posttagmeze ekskurso al la marbordo. Vespere Drs. F. Rouse, prez. de sekcio Brugge de Flandra Ligo Esperantista, elokvente paroladis pri « Esperanto en la moderna tempo ».

Dimanĉmatene okazis dua laborkunsido sub prezido de ĉefestrarano Job Kars. La kunveno decidis sendi telegramon al la belga ĉefministro, opiniis ke la aĝolimo de T. J. O.-anoj devas esti maksimume 25 jaroj — aĝolimo kiu devas ankoraŭ esti grade malaltigata —, ke la « Tutmonda Junular-Organizo » devas esti trairejo al la plenkreskulaj organizaĵoj kaj devas harmonie kunlabori kun la landaj kaj internacia organizaĵoj. La kunveno esprimis kompletan kaj unuaniman konfidon en la T. J. O.-prezidanto S.ano Krijt. Posttagmeze okazis ekskurso al la historia flandra urbo Brugge. Vespere okazis oficiala festkunveno en kunlaboro kun « Paco kaj Justeco », sekcio de Flandra Ligo Esperantista. Tiukaze paroladis ankaŭ S.ano Veenendaal pri novfondota revuo « La Vivo » kiu propagandus la Zamenhofajn konceptojn inter esperantistoj, kaj, per apartaj eldonaĵoj, inter neesperantistoj (tiu intenco ŝajnas al ni tre proksima de la celo de « Universala Ligo »).

Tiuj belegaj kaj ĝuplenaj tagoj forpasis tro rapide kaj lasis profundan impreson pri freŝa entuziasmo kaj juneca ardo. Longtempe la partoprenintoj memoros la vesperajn kunsidojn ĉirkaŭ la kampofajro, kiam aŭdiĝis kantoj jen entuziasmaj, jen sentoplenaj kun akompananta mandolinmuziko, kiam ĉiuj okuloj fiksrigardadis la flamojn, kaj kiam ĉiuj konferencanoj revis senbride pri pli bela estonto por la tutmonda junularo al kies efektivigo ili fervore laboros.

PARTOPRENINTO.